NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
☎: 94.416.44.92
💻: tepgaitj@lg.ehu.es


E-kursoj: Vendrede
Kunvenoj de la sociaro: Vendrede.
Estrar-kunvenoj: 1-a vendredo de ĉiu monato
Eliro al "Nova Placo": 1-a dimanĉo de ĉiu monato

Jar-kotizo: 2.500 pesetoj/15 eŭroj **BBK-konto: 22-1800155-0**

JANUARO/FEBRUARO 1.999


VENONTAJ ESPERANTO-ARANĜOJ

kultura diverseco
en eŭropo



la paska renkontiĝo por la tuta familio

15-a Printempa Semajno Internacia



2-a Azia E-Kongreso



55-a Internacia Junulara Kongreso
Temo: "Komunikado en la informsocio"



Pli detalan kalendaron ĉe la Grupejo kaj en la venontaj paĝoj, kie ankaŭ vi trovos interretajn adresojn, el kiuj elĉerpi ampleksajn informojn.

EEU-KONGRESO.

Ni jam faris la unuajn demarŝojn cele al organizado de EEU-Kongreso, en la jaro 2004, en Bilbao.

Dato (provizora): de la merkredo 25a ĝis la lundo 30a de aŭgusto 2004.

Kongresejo: Fakultato pri ekonomio de la Vaska Universitato.

Aliĝiloj kaj afiŝoj: pentristo helpis nin desegni ilin; la fono estos parto de abstrakta pentraĵo; estos prezentataj dum la hispana kongreso (julie, en Valencio).

Kotizoj: Ni povas anonci ke ili estos pli malmultekostaj ol tiuj de la pasinta kongreso en Verona. Samtempe, estos specialaj kotizoj por tiuj, kiuj aliĝos dum la hispana kongreso aŭ dum UK en Svedio.

Ret-adreso: Ni malfermis ret-adreson speciale por la kongreso. Ĝi estas:

Esperantobilbao@terra.com

TTT-ejo: Tiel kiel ni informas en la unua paĝo de tiu ĉi "Nia Ponto", informojn pri la kongreso vi trovos en:

www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm

Samtempe, ni rememoras al ĉiuj bilbaoanoj (kaj helpemuloj ekster Bilbao) ke, ekde nun ĝis la komenco de la kongreso, **ni kunvenas ĉiuvendrede (7,30 – 9 h.)** en nia sidejo por pritrakti la organizadon de la kongreso, plani kaj taksi la plenumon de la diversaj demarŝoj. Ĉies helpo estas bezonata. Pensu ke temas pri la plej grava evento ĝis nun okazinta en nia urbo, ene de Esperantio.

NOVA E-KURSO ĈE LA VASKA UNIVERSITATO.

Unu jaron plian (jam la trian), disvolviĝas nova E-kurso ĉe la Vaska Univesitato. Ĉi foje aliĝis 16 gelernantoj; la instruado komencis la 10an de februaro kaj finos la 21an de majo. Kiel kutime, la instruisto estas J. Miguel García Iturrioz. Temas pri libervole elektebla studobjekto, oficiale agnoskita kaj kun valoro de 4,5 kreditoj (t.e., 45 horoj).

Nuntempe oni pritaksas la eblecon oferti tiun saman studobjekton por esti instruata pere de komputilo, ene de la tiel nomata "Campus virtual". En tiu "Campus", la gestudentoj ne estas devigataj ĉeesti la universitatajn ejojn; ili lernas pere de Interreto kaj la instruisto respondas la demandojn pere de retpoŝto. Tio permesas la aliĝon de studentoj el kiu ajn fakultato kaj el kiu ajn universitato (se estas antaŭakordiĝo kun la vaska).

KUNVENO DE EŬSKAJ ESPERANTISTOJ.

La sabaton12an de aprilo, en tipa restoracio de Bilbao, okazis komuna manĝo de bilbaoaj esperantistoj kun aliaj alvenintaj el Gipuzko kaj el Alavo; ankaŭ ĉeestis juna esperantistino el Bordozo. Entute, 12 homoj, nome:

El Bilbao: J. Miguel García, Patxi de la Hoz, Iñaki Vélez, Joxemari Sarasua, David Mediavilla kaj Alfredo Cuesta.

El Vitorio: Rafa Blanco, Natxo Apaolaza kaj Xabi Rico

El Gipuzko: Nicolás Gil kaj Javi López.

Temis nur pri renkontiĝo de malnovaj amikoj. Post la manĝado, ili promenis laŭ la rivero ĝis la muzeo Guggenheim kaj guis la ĵus inaŭguritan promenejon.



INTERVJUO EN RADIOSTACIO.

La 14an de aprilo, J. Miguel García estis mallonge intervjuata en "Radio Nacional". Temis pri 3-minuta intervjuo, kiun oni faras ĉiutage al iu bilbaoano kapabla alporti ian novaĵon.

Tempo mankis, sed tamen sufiĉis por paroli pri la venontjara EEU-kongreso, pri la E-kurso en la Vaska Universitato kaj eĉ iomete pri la preskaŭ centjara historio de nia E-Grupo.

La intervjuanto, ege agrabla kaj simpatia homo, restis je nia dispono por fari estontajn intervjuojn, pli longajn, kiam alproksimiĝos la kongreso. Li estas kuzo de nia samideano José Pérez-Salado Kamps, danke al kiu ĉio-ĉi realiĝis.

(FI) LINGVO: ESPERANTAJ INSULTOJ.

Laŭ la difino de Renato Corsetti,"insultoj estas vortoj uzeblaj por ofendi alparoli homon aŭ ofende priskribi aĵon aŭ situacion"; kaj, ĉar esperantistoj ne estas sanktuloj (almenaŭ la plimulto!) certe bezonas ja tiajn vortojn por lingve interrilatiĝi. Aldone, la mondo ne perfektas!. Do, pliriĉigu vian vortaron kaj spicu vian konversacion. Jen kelkaj eroj bedaŭrinde tre utilaj:

Aĉulo, fiaĉulo, fi-homo (kontraŭ homo pro fizika aŭ morala malboneco); arogantulo (pro troa memfido); azeno, fojnkapulo, kreteno, malsaĝulo, sencerbulo, stultulo, ŝtipo (pro stulteco); babilulo (pro troa parolemo); bandito (pro rabemo aŭ eksterleĝaj agoj); besto (pro krudeco, malklereco, stulteco); bird-timigilo (pro ĝeneco, tedemo, malbelega aspekto); bruto (pro krueleco); ĉarlatano (pro trompado de la publiko); ĉiesulino, putino (kontraŭ virino pro malmorala konduto; la viran ĉi-respondan alternativon mi ne konas, supozeble ĉar nur virinoj malmoralas!?); faŝisto (pro reakciaj politikaj ideoj); filertulo (pro trompemo); fiulo (pro fia konduto); frenezulo (pro neracio); fripono (pro ruza trompemo, malico); fuŝulo, sentaŭgulo (pro malkapablo); huligano (pro kontraŭsocia konduto); hundaĉo (pro fieco); kanajlo (pro malnobla friponeco); klaĉulo (pro disbabilado pri aliaj homoj); monstro (pro malbeleco, krueleco); murdisto (pro krueleco, krimeco); naŭzulo (pro naŭzeco); parazito (pro paraziteco, fieco); rabisto (pro krimaj agoj); ruzulo (pro ruza elturnigemo); serpento (pro malico, perfidemo); ŝovinisto (pro troa glorado de sia popolo); volapugisto (serĉa insulto kontraŭ homo pro ties stulteco, kombino de volapukisto kaj pugo).

Kaj ne skandalu; mi elektis la plej molajn aŭ ne tro malmolajn. Ĉu ne sufiĉaj?. Merdo! Iru al la diablo! Putru for! Forbalaŭ vin! Forblovu vin! Ruliĝu! Dissaltu kiel obstinaj baroj de mil jaroj! (Ĉi-lasta, aludo al la versaĵo de Zamenhof "La Espero").

I.V. (Parte, el la legolibro "Vojaĝo en Esperanto-Lando").

FABELO: "MONAĤO, KIU TRANSFORMIĜIS JE AZENO".

Iam viro plugadis per du azenoj ĉe arbarrando. Li iris en la arbaron por branĉetoj, dume la du azenoj restis jungitaj al la plugilo.

Alvenis du monaĥoj, kies ĉaron tiris nur unu azeno. Ĉu mi esprimas min ĝuste?. Ĝi tiris nur, sed pro malsato ĝi apenaŭ povis tiri la ĉaron.

Ili rigardis la du azenojn ĉe la arbarrando kaj interkonsentis, ke ili prenos unu azenon. Poste ili iris al la plugilo. Unu el la monaĥoj maljungis la maldekstran azenon kaj forkondukis ĝin. La alia monaĥo surmetis la jungilaron de forkondukita azeno kaj li staris tiel antaŭ la plugilo ĝis la posedanto revenis.

Li konsterniĝis:

- Kion vi faras ĉi tie? Kien vi metis la alian azenon?- li demandas la monaĥon.

Tiu respondas jene:

- Mastro, mi estis ĝis nun sorĉita. La sorĉo ĵuse forpasis kaj mi ree transformiĝis je homo.

La kamparano miris pri tio kaj diris:

- Ej, kiel ofte mi batis vin, sed mi vidas, ke tio ne damaĝis. Se tiel okazis, iru kien vi volas!.

Li deprenis la jungilaron kaj lasis ĝin foriri.

La alia monaĥo atendis lin ĉe la arbarrando. Ili migradis ankoraŭ kelkajn tagojn, sed poste en alia vilaĝo ili vendis la azenon en foiro. Poste ili iris hejmen.

Al tiu foiro venis ankaŭ la mastro por trovi paron al sia azeno. Kiam li tie vagadis, inter multaj vendataj azenoj li ekvidis la sian. Li ne povis prezenti al si, kiel fariĝis la monaĥo denove je azeno. Li iris al la azeno kaj flustris al ĝi en la orelojn:

- Pastro, vi vane staras ĉi tie, mi ne aĉetos vin denove!.

Poste li forturnis sin kaj aĉetis alian azenon.

Hungara popolfabelo.
Tradukis: Ilona Fedor.